N-o 5. **BULTENO** 1936. 1. VII.

**DE ESPERANTO-ASOCIO EN ĈSR.**

*Redakcio kaj administracio: Praha XIX., Uralské nám. 447. Telefona n-ro 718-41.*

*Redaktas: ST. KAMARYT.*

*Senpage por membroj de Esperanto-Asocio en ĈSR. Aperas sesfoje dum la jaro.*

## Nuna situacio de UEA.

Ĝi ne estas brila. La komitato per malgranda plimulto decidis dividi la laborojn en du centrojn. La administron kaj organizon de praktikaj servoj en Londonon, kun nova direktoro Goldsmith, ĝis tiam oficisto de la Brita E-Asocio, kaj organizon de propagandaj kaj reprezentaj taskoj Stockholmon kun estro Malmgren. Divido de ambaŭ taskoj de nia centra organizo al du sekcioj kaj al du cerboj estas certe saĝa kaj povas sole utili. Tiun bezonon Sklenčka, Hromada, Ginz, Kamaryt, Pitlík daŭre rekomendis; ni daŭre predikis al oreloj, kiuj ne volis aŭskulti, ke estas bezonaj du sendepende laborantaj cerboj por organizi la du diferencajn taskojn de nia internacia centro: la praktikan aplikon de esperanto kaj la propagandon. Ekzisto de Internacia Centra Komitato kaj de tiama UEA kun la du direktoroj kaj unu prezidanto ŝajnis al ni la plej taŭga solvo. La strangaj atakoj de s-ro Delanou signifis komencon de disputoj, kiuj finis per elpelo de sperta direktoro Jakob, malofta verkista talento de Privat kaj aŭtoritata kaj oferema prezidanto Stettler. La francaj amikoj kunligis la administron de UEA kun unusola direktoro R. Kreuz, tre diligenta laboranto, sed evidente malsana homo. Kiam li subite mortis, la estraro venas al tio, kion ni daŭre rekomendadis: kreon de du centroj. Ni povus moki. Ni ne mokas. Ni daŭre estas konvinkitaj, ke internacia centro estas nepre bezona, ke ĝi devas esti ekipita per taŭga ilaro, kaj ni ankaŭ en la nova situacio estas pretaj kunlabori.

Sed la ŝanĝo de la sidejo bezonas ŝanĝon de la statuto, kiun devas aprobi delegitoj. Multaj estas kontraŭ tiu translokiĝo. La UEA-anoj en Genève dissendis flugfolion, kiu informas la delegitojn pri argumentoj por resti en Genève.

La delegitoj devas sendi siajn balotilojn antaŭ la 4-a de julio. Ni donas al ili neniun konsilon kiel baloti. La delegitoj ja ebligas al UEA la vivon per mono de ili enkasigata. Ilia fervoro dependas de ilia kontenteco. Ili prijuĝu mem la argumentojn donitajn de prezidanto Bastien kaj de samideanoj svisaj. Ili pesu siajn personajn sentajn kaj sentimentalajn plaĉojn kaj laŭ ili balotu.

Sed ili ne forgesu, ke forta kaj bone funkcianta UEA estas nepra kondiĉo de nia sukcesa laborado.

---

### Vojaĝo al Viena kongreso kaj vizito de Aŭstrio.

Al la nuna numero estas aldonita informa presaĵo pri la XXVIII-a, kiun ni varme rekomendas al atento kaj uzo. Zorgu, ke partopreno de ĉeĥoslovakaj esperantistoj estu impona. La kotizo al la XXVIII-a estas ĝis 15./7. Kč 256·—, por familiano Kč 161·—, por gejunuloj Kč 109·—, depost 15./7. Kč 285·—, Kč 177·60, Kč 130·—. Por helpkongresanoj ĉiam Kč 120·—. Aliĝo povas ankaŭ okazi per simpla monsendo kaj LKK post ricevo de la sumo sendos la kongreskarton.

La Turista komisiono de EAĈSR, gvidata de s-ro Robert Bloch, aranĝos komunan vojaĝon al la kongreso, verŝajne aŭtobusan. Projektata estas ankaŭ vizito de Grossglockner. Ĉio por tre oportuna prezo, kiu estos despli malalta, ju pli multe da partoprenantoj sin anoncos.

Skribu tuj senpere al R. Bloch, Praha-Smíchov, poukázková ústředna. Vi ricevos ĝustatempe ĉiujn detalojn.

---

## Kroniko esperantista en ĈSR.

**Rezultoj de enlanda organiza unuecigo** efektivigita en la Brna kongreso kaj daŭrigita per la lasta ĝen. kunveno de ĈAE estas jam videblaj. La organizoj kaj entreprenoj esperantistaj, kiuj dum multaj jaroj staris aparte, aliĝis jam aŭ traktas pri aliĝo al Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko. Neŭtrala Centro ĉesigis sian funkciadon kaj ĝia estro s-o R. Bloch, komitatano de la Asocio, akceptis funkcion de

estro de nia turista komisiono. BES-Adresaro aliĝis al EAĈSR kiel entrepreno kaj ĝia posedanto s-o Ing. L. Berger aliĝis al la asocio kiel membro. Ni faris kun li kontrakton, laŭ kiu niaj anoj aliĝintaj al la adresaro havas 10% rabaton. (Do ili pagas sole 7·20 Kč por enskribo kaj por la adresaro.) Ni varme rekomendas al niaj anoj aliĝi al la adresaro. Nia Libro-Servo akceptas la aliĝojn kaj sendas la prospektojn laŭ la mendo. Ĉs. E. Instituto decidis jam reguligi sian rilaton al la asocio kaj komisiis sian prezidanton s-on Dron Pitlík trakti pri la detaloj kun la asocia prezidanto; la traktado daŭras. Al Moraviaj Esperanto-Pioniroj ni sendis proponon pri kontrakto. Kun Ligilo ni daŭre kunlaboras. Ni sciigas tiun ĉi staton tre kontente, ĉar ni kredas firme, ke organiza ordo estas unu el gravaj kondiĉoj de nia sukcesa laborado. Ni vidas en tiu ĉi ĝojiga stato ankaŭ argumenton por devo de ĉiu esperantisto en nia lando, ke li estu nia ano.

**Nova Esperanto-memorŝtono** estis inaŭgurita 24. V. en Lichnov apud Frenŝtát. Ĝi estas plaĉa monumenteto farita de skulptisto V. Brázdil laŭ skizo de samideano J. Špaček. Sur soklo el du ŝtupoj estas metita stelo kaj apud ĝi tabulo kun ĉeĥa-esp. teksto: „Památce — Dr. L. L. Zamenhofa — tvůrci — mezinárodní řeči — Esperanto — *1859 †1917 — Al memoro — de Dr. L. L. Zamenhof — la kreinto — de internacia lingvo — Esperanto — 1936." La memorŝtono staras antaŭ la lernejo. Ĝi kostis 600 Kč. La monon kolektis s-o Roman Michna per podoma kolekto kaj el kolekto inter anoj de la klubo en Kopřivnice. S-o Tichavský donacis sablon en fundamenton de la monumento. Decido permesi starigon de la memorŝtono estis farita de la komunuma estraro laŭ rekomendo de estro de la urbeto s-ro Jan Stiborek, lernejestro. Por inaŭgura festo oni aranĝis E-Tagon. Kunvenis 300 homoj. El Moravská Ostrava venis 30 espistoj per aŭtobuso. La inaŭguran solenon malfermis prezidanto de E-rondeto en Lichnov R. Michna, salutinte la ĉeestantojn. Post li la komunum-estro J. Stiborek parolis ĉeĥe pri signifo de E-o kaj pri vivo de ĝia kreinto kaj akceptis la monumenton en protekton de komunumo. Sekvis esperantlingva prelego de R. Zanáška (Kopřivnice), salutoj de REL (V. Slaný) kaj de EAĈSR (inĝ. L. Krajc). Salutleterojn sendis E. K. en L. Bělohrad kaj REL el Č. Těšín. Al respublika prezidento estis sendita saluttelegramo. Post la inaŭguro estis koncerto en la lerneja ĝardeno kaj vesperon danco. — La samideanoj en Lichnov akceptu nian dankon pro tiu ĉi iniciato tre sukcesa.

**Regiona kunveno** en L. Bělohrad kunvokita de la loka Klubo okaze de malfermo de la Grandhotelo Urban la 31. V. 1936 kunvenigis 36 samideanojn krom el Bělohrad el Praha, Kladno, Ml. Boleslav, Dobrovice, Hořice v Podkrk. Prezidis la kunvenon Dr. Goldberger kaj K. Koutek el Praha.

**Ĉs. Esperanta Instituto** en Praha gratulante al prezidento Dro E. Beneš okaze de lia elektiĝo transdonis al li kiel rememoron pri lia ĝisnuna favoro al la esperantista movado multekoste binditan ekzempleron de la Ĉeĥoslovaka Antologio.

**Ŝtataj ekzamenoj pri esperanto.** En Praha la 4-an kaj 5-an de aprilo faris ekzamenon: Barták A., instruisto en Kouňov apud Žatec, Bloch R., sekretario de poŝtministerio en Praha, Košvancová-Machovcová A. el Dolní Bousov, Mádr M., instruisto en Velím, MUDr. Rôna E., veterinaro en Výlok, Ŝavel V., priv. ofic. en Praha kaj Špůr V., ŝparkasofic. en Sadská. Kiel ekzamena komisaro funkciis Dro Pitlík. — En Bratislava estis la 22. IV. 1936 ĉe la ĉs. komisiono por burĝaj kaj popolaj lernejoj ekzamenitaj kaj aprobitaj pri esperanto kiel laŭvola fako por burĝaj lernejoj jenaj s-oj: Jar. Gadula (Mor. Ostrava-Zábřeh), Karel Koráb, direktoro de burĝa lernejo (Stonařov), Jan Raszka (Nový Bohumín), Vlad. Slaný (Mor. Ostrava-Vítkovice), Oldřich Vaněk (Čes. Třebová), Jos. Vondroušek (Brno). Ekzamena komisaro estis Dro St. Kamaryt.

**Gazeta servo.** La administranto de nia Gazeta Servo pro multaj neniel prokrasteblaj okupoj povas nur nun raporti pri la rezultoj de la laboro en j. 1935. Publikigis (rezultoj el 1934 inter krampoj):

| gazetoj | | | artikolojn | |
|---|---|---|---|---|
| 106 | (116) | en Praha | 468 | (567) |
| 67 | (22) | en cetera Bohemio | 524 | (506) |
| 48 | (69) | en Mor.-Silezio | 399 | (771) |
| 33 | (26) | en Slov., Subkarpata Rusio | 109 | (149) |
| 3 | (2) | en ĉsl. ekster respubliko | 5 | (2) |
| 257 | (235) | | 1505 | (1995) |
| | | Antaŭe ne notitaj estis | | |
| 55 | | gazetoj germanlingvaj en ĈSR kun | 261 | artik. |
| 312 | | gazetoj kun | 1766 | artik. |

Ni ne estas kontentaj pri la rezultoj de tiu ĉi plej grava propaganda laboro. La sufiĉe fortan malkreskon ni klarigas per neveno en niajn manojn de artikoloj certe

aperintajn. Kun honora escepto de kelkaj membroj ĉiuj ceteraj tute malatentas ĉi tiun gravan kaj facilan manieron de kunlaboro. Ni alvokas niajn membrojn denove kaj insiste, ke ili al ni sendadu ĉiun mencion pri internacia lingvo, kiun ili trovas en la ĉeĥoslovaka gazetaro.

**Agado de lektoro H. Seppik.** La sukcesa Cseh-metoda instruisto Seppik venis la 22. III. urbon Prostějov por eklabori en la Haná-regiono. Li havis dum aprilo-majo kursojn por komencantoj en Prostějov (50 p.) kaj en Olomouc (60 p.) Provlecionojn li havis en Prostějov (1), Olomouc (2), Brno (1), geografiajn prelegojn pri Svedlando, pri Estonio aŭ pri Laponio en Hluk, Uh. Hradiště (2), Mor. Ostrava (2), Prostějov, Olomouc (2). Ankaŭ en tiuj urboj estis sukcesoj de la kursoj kaj de la prelegoj tre bonaj kaj alvenigis al nia movado valorajn adeptojn. — La 17-an de majo li foriris el Prostějov kaj forveturis en sian patrujon por iom ripozi post efektive streĉa kaj sindona laboro.

Dum lia ĉeesto en nia lando vizitis liajn prelegojn geografiajn sume 5.200 personoj, provleciojn 600 p., kursojn 270 p. En Košice aliĝis el liaj kursanoj al la E. Klubo kaj per tio al nia Asocio 48 novaj anoj. Pri aliĝoj en Prostějov kaj Olomouc ni povos raporti en venonta numero.

Tiuj ĉi tre kontentigaj rezultatoj devigas nin inviti s-on Seppik ankaŭ por aŭtuno 1936, kiam ni sendos lin en alian regionon. Sed ni nepre invitos almenaŭ ankoraŭ unu pluan Cseh-metodan instruiston, por ke ilia laboro efiku sur pluraj lokoj samtempe. Ni traktas kun tre eminentaj instruistoj. Tial ne hezitu precipe lokoj, kie estas tre malmultaj aktivaj esperantistoj, anonci sin! Ili spertos surprizon. Kreskos ilia membro-nombro. Vi povas turni sin senpere al nia hon. kasisto J. Friedrich en Košice, Jarná 13.

---

## Esperantista vivo.

**Alois Horáček,** persista propagandanto de nia lingvo en Kutná Hora atingis la 15-an de majo 1936 sian sepdekan jaron. Li estas fondinto de la loka klubo, kiu funkciis jam antaŭ la milito sub lia gvido. Li estas ekzemplo de laboranto dediĉinta sin plene al la idealo, kiun li trovis bona. Persisteco de tiaj laborantoj meritas ĉiam esti vidigata kiel modelo. La jubileanto akceptu nian gratulon kaj deziron, ke ni post pluaj dek jaroj alparolu lin same freŝan kaj laboreman.

**Mortis Josef Eiselt.** Li naskiĝis 12-an de marto 1858. Li estis atingita de esperantisma ondo, kiu kuris tra Eŭropo post jaro 1900, kaj estiĝis fervora kaj persista esperantisto. Li estis profesoro kaj poste direktoro de gimnazioj en tiama aŭstro-hungaria Bosnio kaj atingis la plej altan distingilon tiaman, ricevinte antaŭ pensiiĝo titolon de registara konsilisto. Li daŭre partoprenis movadon en Bosnio kiel unu el la aŭtoritataj kaj gvidaj personoj. En 1910 fondis en Sarajevo unuan klubon de tiu lando „La stelo Bosnia". Tiam ankaŭ li tradukis kaj aperigis kroatan Ĉefeĉ-ŝlosilon. Pensiiĝinte li translokiĝis en sian patrujon kaj loĝis en Praha. Ankaŭ hejme li disponigis al la movado sian organizan persiston kaj talenton kaj akceptis funkcion de prezidanto de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista. Tiun funkcion li havis depost fondiĝo de la asocio en j. 1920 ĝis 1929. Tiam li estis elektita honora membro de ĈAE. Li partoprenis ankaŭ en organizo de la loka movado en Praha kaj estis dum vico de sinsekvaj jaroj prezidanto de E. Klubo en Praha kaj poste estis elektita ĝia honorprezidanto. Li estis ankaŭ por esperanto ano de ŝtata Ekzamena komisiono por burĝaj kaj popolaj lernejoj en Praha depost kreo de tiu ĉi funkcio en j. 1921. En Ĉs E. Instituto li akceptis funkcion de direktoro de ĝia Privata Esperanto-Lernejo. En 1930 li verkis por popolkleriga societo Masarykův Lidovýchovný ústav lernolibron „E. pro každého". Li estis homo nekutime laborema, oferema, persista kaj kune nekutime modesta. Lia agado multon helpis al la movado en Jugoslavujo kaj en Ĉeĥoslovakujo. Plenuminte ĉiujn servojn, kiujn li povis doni al la mondo, li mortis 4-an de aprilo 1936 en Praha. Dum lia enterigo kunvenis granda aro de esperantistoj de Praha por adiaŭi al la morta prezidinto.

---

**Lázně Bělohrad vin invitas!** Ĝi fortigos vin korpe kaj spirite. La vere esperanta banloko kaj libertempejo, kie vi povas paroli esperante kun la staciestro kaj ĉiuj ceteraj oficistoj de la fervoja stacio, en la poŝto, en la banko kaj en via loĝejo. Postulu detalojn de Esperantista klubo en Lázně Bělohrad.

**Bulteno n-ro 4** estis unupaĝa admonilo, per kiu ni petis pagi kotizojn al EAĈSR kaj al UEA. Se iu pagis ambaŭ tiujn kotizojn kaj tamen ĝin erare ricevis, li bonvolu pardoni. De la ŝuldantoj ni esperas, ke ili respondos nian alvokon. La jamaj pagintoj, kiuj ne ricevis tiun numeron kaj tamen deziras ĝin havi en sia kolekto, bonvolu reklamacii (per letero aŭ poŝtkarto sen afranko kun surskribo „Reklamace časopisu" kaj kun jena teksto [nacilingva]: „Mi reklamacias la n-ron 4, kiun mi ne ricevis") kaj ni tuj sendos la numeron.

**Esperantista rendevuo en Hradec Králové 28. VI. 1936.** Al la kunvenoj de esperantistoj en la malnova esperantista centro Hradec Králové estis ĉiam rajte aljuĝata speciala signifo. Kunvenis tie ĉiam bonaj laborantoj kaj la kunesto estis ĉiam plej agrabla. Tial ni esperas bonan sukceson de la kunveno, kiun nun kunvokas la Esperantista klubo en Hradec Králové. Anoncu vin tuj al la kluba

sekretario s-ro Frant. Pytloun, Kukleny 113 apud Hradec Králové.

**Kursoj en Danlando.** Detaloj pri la kursoj en la dana Kornmod estis en la Bulteno nro 3. Nun ni volas aldoni pri la Someraj kursoj en Helsingör (Danlando): Estos du kursoj (perfektiga kaj por Ĉe-instruistoj) samtempe dum 10 tagoj de 26./VII. ĝis 5./VIII. 1936, gvidataj de la ges-roj Saxl, de Waard, Janson, Noll kaj Friis. Suma kosto por 10 tagoj (kursa kotizo, loĝo kaj kvinfoja manĝo ĉiutaga en Internacia Altlernejo de Helsingör) Kč 263·—. Okazos ekskursoj, ankaŭ al Svedujo. Detalan prospekton postulu ĉe L. Friis, Thyrasvej 15, Aabyhöj, Danlando.

**Esperantaj gvidlibroj en Ĉeĥoslovakio.** Ni konsilas al ĉiuj ĉeĥoslovakaj eldonintoj de esperantaj gvidlibroj aŭ folioj, ke ili disponigu ian kvanton al EAĈSR. Nia Centra oficejo en Praha estas preta transdoni ilin al la eksterlandaj vizitantoj de Praha kaj instigi ilin tiel veturi al lokoj, kiuj sin propagandas ankaŭ per internacia lingvo. Ni faras tiel regule pri Hradec Králové, Kolín kaj Lázně Bělohrad.

**Oficejo de EAĈSR dum somero.** Ni petas niajn membrojn pri ioma pacienco dum la nun sekvontaj semajnoj. Dum la someraj monatoj libertempas pluraj komitatanoj kaj komisionestroj kaj ankaŭ la gvidanto de nia administracio. Ni klopodos ankaŭ tiam respondadi laŭeble plej rapide, sed bonvolu kompreni, se en aferoj ne tre urĝaj venos nia respondo kun ioma prokrasto. Ni dediĉos al ĉiu letero la necesan atenton, eĉ se ni ne povos ĉiam rapide respondi. Centra oficejo de EAĈSR.

**Fondaĵo de Bulteno.**

| | |
|---|---|
| Lasta stato . . . . . . . . . . . . . | Kč 100·— |
| s-ro V. Mauksch, Lubica (dua donaco) | Kč 25·— |
| | Kč 125·— |

Sinceran dankon kaj anoncu sin sekvantoj!

**Aliĝu senprokraste**

al la jam 13-a eldono de

**BES-ADRESARO**

**de esperantistoj el ĉiuj landoj,**

la unika kaj por ĉiu bezona helpilo, etika propagandilo, ĉiujare aperanta kun pli ol 1000 adresoj kaj portretoj de esperantistoj el pli ol 40 landoj, kun detala registro de aliĝintoj laŭ profesio kaj inklinoj, de E-firmoj laŭ fako, de E-societoj kaj gazetoj, de E-hoteloj, tiel ke ĉiu povas tuj trovi la deziratan adreson!

Aliĝa kotizo kun adresaro sole 8·— Kč, publikigo de portreto kostas 4·— Kč. Anonca paĝo 200·— Kč, anonca linio 6·- Kč. Membroj de EA en ĈSR ĝuas 10 procentan rabaton kaj povas aliĝi ankaŭ pere de la Asocio! — Detale pri ĉio informas la 10-paĝa prospekto, kiun al ĉiu volonte sendas la eldonejo

**BES**

(Berger'a E-Servo)

**POTŠTEJN.**

Nia entrepreno aliĝis al EAĈSR.

## Ricevitaj libroj kaj gazetoj.

*Internacia Pedagogia Revuo* aperas jam 15-an jaron. Ĝi estas grava membro inter la esperanta gazetaro kaj devas ĝin legi ĉiu edukisto-esperantisto. Petu senpagan specimenon de la administranto P. Korte, Schoolstraat 13, Veendam (Nederlando).

*La Pirato* ĉesis aperi pro trookupiteco de la red. Raymond Schwartz. La malapero de tiu ĉi certe unika revuo de sia speco afliktos multajn.

*Internacia SOS-Bulteno* (adreso: s-ro Michel Alglave, 150, rue Cronte-Voye, Blanc-Misseron, Francujo) enhavas kompletan liston de ĉiuj radiosendoj esperantaj. Jara abono 9 fr. frankoj.

*Esperantský dopisovatel* de J. Šupichová estas utilega verko por ĉiu, kiu deziras korespondi esperantlingve. Modeloj de privataj kaj komercaj leteroj kaj vortaro. Por Kč 12·80 afr. liveras Libroservo de EAĈSR.

*Rembrandt, la magiisto.* (La tragedio de artista vivo). Biografio kaj priskribo de la gravaj desegnaĵoj, akvafortoj kaj bildoj de la granda majstro, verkita en esperanto de M. Muller, konservanto de la Rembrandt-domo en Amsterdam. Eldonis Holanda Eldonejo „Esperanto", Amsterdam. 162 pĝ 14x23 cm, 100 ilustr. Tole bindita Kč 40·—. Valorega verko pri la granda majstro nederlanda, pri la vivo, malgaja sorto kaj pri lia laboro. Reproduktoj de la mondfamaj bildoj. La esperanta literaturo ne povas esti sen verkoj de tiu ĉi speco, kiuj prezentas al ni eternajn valorojn.

**Vizitu Budapest,**
la belan urbon sur Danubo, la urbon de AELA. Al la vizitantoj esperantistaj proponas siajn servojn la **Hungara Generala Kreditbanko** en Budapest V., József-tér 3-4, kiu okupas la gvidantan rolon ankaŭ en la hungara fremdultrafiko. Senpagan prospekton pri Budapest kaj pri ĝiaj sanigaj banejoj postulu de la oficejo de EAĈSR.

**Pasigu vian someron en Karintio**
(Aŭstrio) ĉe la ĉarma lago de Millstadt. Moderaj prezoj kaj agrabla loĝado ĉe samideano Johann Laggner, poŝtestro, Seeboden am Millstättersee, kiu donas ĉiujn detalojn.

**Juvelimitaĵoj,**
broĉoj, braceletoj kaj ĉiuspecaj vitraĵoj malmultekoste haveblaj ĉe samideano **Adolf Novotný, Těpeře 61**, p. Železný Brod. Ankaŭ esperantaj insignoj el vitro.

**Franca akvo Tatra**
kun esperanta stelo kaj esperanta surskribo estas fabrikata de **A. Pecháček en Slezská Ostrava,** Bezručova. Boteleto 4 Kč, granda rabato ĉe pogranda aĉeto.

**Skriba kurso de esperanto**
estas preparata. Interesuloj povas sin jam nun anonci kaj ricevos ĝustatempe pluajn informojn.

**Korespondi deziras**

japanaj knabinoj kun junulinoj malpli ol 30-jaraj. Turnu vin al f-ino Yukiko Isobe, sekretariino de Kokusai-Sizyo-Sinzen-Kyokai (Internacia Societo de Junaj Virinoj), 7-5. Ginza-Nisi, Kyobasi, Tokyo, Japanujo.

Kun studento pri kulturaj kaj politikaj laboroj de ĉeĥoslovaka studentaro deziras korespondi Ratimir D. Nikolič, st.teh., Beograd, Komneu Barjakara 3.

Pedagogia instituto, Esperanta grupo, Ĥarkov, ul. Libkneĥta 33, Ukrainio (USSR) organizas korespondadon kun studentoj kaj pedagogoj.

H. Bačvarov, gimnazia instruisto, Tirnovo (Bulgario) serĉas korespondantojn por siaj lernantoj. — S-ro instruisto Valčanov (vidu Bultenon n-o 3) ne plu estas en Tirnovo.

Vychází 6krát do roka. — Vydavatel: Svaz esperantistů ČSR. v Praze XIX., Uralské n. 447. — Zodpovědný redaktor Fr. Slavík — Tiskne A. Pražák, Jablonné n. O. — Novinová sazba povolena Ředitelstvím pošt a telegrafů v Praze, č. 102.047-VII-1933. - Podací úřad Praha 54.